## INDIVIDUA ALIĜILO

Plenigu ĉi tiun bultenon (ambaŭflanfe) kaj sendu ĝin kun via pago al
S-ro Stéphane RICHARD (esperantoliono@gmail.com)
28, rue du Bœuf
69005 LYON

☐ Pago per ĉeko: je la nomo de Esperanto-Lyon

☐ Pago per banka ĝiro al:
IBAN : FR76 1027 8073 1900 0208 1400 185 BIC : CMCIFR2A

☐ rete en https://esperanto-france.org/perso

*(Neniu enskribiĝo estos akceptita sen pago.)*

La kotizo inkluzivas la enir-rajton, la luadon de ĉambroj, ĉiujn kulturajn eventojn (prelegoj, koncertoj, ktp.), ĉiujn kunvenojn kaj ekskursojn.

☐ 30 € por la homoj 30 jaraj kaj pli, membroj de Espéranto-France aŭ eksterlandaj loĝantoj

☐ 40 € por la homoj 30 jaraj kaj pli, ne membroj de Espéranto-France

☐ 15 € de 16 ĝis 29 jaraj, studentoj, senlaboruloj

☐ senpaga ĝis 16 jaraj

☐ plialtigo je 10€ por inskribiĝo post la 1-a de Aprilo

Familia nomo. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Persona nomo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Adreso . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Poŝtkodo . . . . . . . . . . Urbo. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Lando . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Telefono . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Retadreso . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Naskiĝdato . . . . . . / . . . . . . / . . . . . .

☐ Mi deziras vegetaran bufedon

Dum tri tagoj mi deziras partopreni esperantajn kursojn:

☐ ekzameno FEI

☐ nivelo komencanto

☐ alia nivelo (precizigu : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . )

## PRÉSENTATION DE LYON

**Lugdunum**, ĉefurbo de la Tri Gaŭlioj nomita **Lyon** ekde la 13-a jarcento, estas vizitinda urbo por malkovri ĝiajn **historion** kaj **kulturon**, gustumi la famajn **gastronomiajn specialaĵojn**, sed ankaŭ promeni por ĝui la ĉarmojn de la urbo, ĝiajn riveregojn kaj parkojn. Ĝia **historia centro** estas enskribita en la **Monda Heredaĵo de Unesko**.

La urbo estas superita de du montetoj: **Fourvière** (la preĝanta monteto), okcidente, kaj **Croix-Rousse** (la laboranta monteto), oriente. Ĉi lasta etendiĝas al la duoninsulo formita de aluvioj deponitaj ĉe la kunfluejo de la du riveroj: la rivero **Rodano**, potenca, descendanta de la Alpoj, kaj **Saono**, pli trankvila kaj facile navigebla rivero, kiu ligas Lionon al la ebenaĵoj de nordorienta Francio.

**Fondita de la romianoj** ĉirkaŭ 43 jaroj antaŭ nia erao, ĝi rapide iĝis la **ĉefurbo de laTri Gaŭlioj** en la 1-a jarcento antaŭ nia erao. Ĝi situas en loko kun **granda strategia kaj komerca graveco**, kie la **kulturaj tradicioj** de multaj partoj de Eŭropo kunfandiĝis por krei homogenan kaj viglan komunumon.

**Meze de la 15-a jarcento**, Lyon estis **unu el la plej loĝataj urboj en Eŭropo**: ĝi havis 36 kvartalojn, ĉiu kun sia propra komerca specialaĵo; nur la deklivoj de Ruĝema Kruco (Croix-Rousse) estis malmulte konstruitaj, ĉar ili estis rezervitaj por la “kamparaj ” vilaoj de riĉaj italaj aŭ germanaj komercistoj, aŭ eĉ por vitejoj. Troloĝantaro kaj risko de epidemioj puŝis al efektivigo de regularo pri planita ekspansio, laŭ iniciato de religiaj ordenoj, meze de la 16-a jarcento. **Novaj kvartaloj** kreiĝis en la 17-a jarcento, precipe sude la zono de **Bellecour**, ĉirkaŭ Reĝa Placo (nuna Placo de Bellecour).

La **plano de Liono**, kiel ni konas ĝin hodiaŭ, estas sintezo de la evoluo de la urbo, kie la distriktoj de mezepokaj stratoj tuŝas la urbon planitan en la 18-a kaj 19-a jarcentoj.

La urbo dividiĝis en **distriktojn** post la aneksado de malgrandaj najbaraj urboj: 5 kreiĝis en 1852, la 6-a en 1867, la 7-a en 1912, la 8-a en 1959 kaj la 9-a en 1964.

Ĝi estas parto de la **Metropolo de Liono**, kreita en 2015, kies nuna prezidanto estas Bruno Bernard. La nuna urbestro de Lyon estas Grégory Doucet. Ĉi tiuj du elektitoj estas ekologiistoj.

## ĈEFA KONGRESEJO

**Maison des Italiens**
**(Domo de la Italoj)**
82 Strato de Dauphiné
69003 Lyon

**Pliaj informoj ĉe esperantolyon.org**



foto: @walakte /freepik

# Interasocia kongreso de **Esperanto** en **Francio**

## 6-a – 8-a de majo 2023 en **Lyon**



foto: Bruno Flochon



foto: Daniel VILLAFRUELA /Wikimedia Commons

**Post-Kongreso**
la 9-an de majo
en **Saint-Étienne**

## PRAKTIKAJ INFORMOJ

### loĝejo

Limigita nombro de ĉambroj estas disponeblaj en Internacia Restado Centro de Liono (CISL), kiu situas:
103 boulevard des États-Unis (bulevardo de Usono)
69008 Lyon
(buso C16,tramo T4 kaj T6, haltejo Beauvisage-CISL)
La rezervadoj estas administrataj de Esperanto Liono ekskluzive per la kongresaliĝilo antaŭ la limdato de la 25-a de aprilo 2023.
Aliaj hoteloj, ne administrataj de Esperanto Liono, estos indikataj sur la retpaĝo dediĉita al la kongreso (esperantolyon.org)

### manĝejo

En CISL, troviĝas **memserva restoracio**, kun vegeteranaj pladoj.

Por la **sabata tagmanĝo**, ni invitas la kongresanojn kunporti regionajn specialaĵojn, kiuj estos partigitaj en komuna manĝo post la aperitivo donacita de Esperanto Lyon. La Lionanoj gustumigos al vi la faman lionan kolbasegon en brioĉo kaj fromaĝan specialaĵon nomita “cervelle de canut” (cerbo de silklaboristo). Por la **dimanĉa tagmanĝo**, post la membrokunveno de Espéranto-France kaj la aperitivo donacita de Esperanto Lyon, ni proponas azian bufedon (25€).

Ĝi estos azia pro la komerca ligo inter Liono kaj Ĉinio ekde la 19-a jarcento, unue pri la silko (fresko pri tiu temo situas en strato Carquillat en la unua distrikto) kaj due pri la vendo de kamionoj de la firmao Berliet ekde 1964. Liono ankaŭ akceptis rifuĝintojn el Kamboĝo kaj Vietnamio kaj la bufedorganizantino devenas de Kamboĝo.

**Vegeteranaj pladoj** estos proponataj. La trinkaĵoj estos pagendaj kaj libere mendataj ĉe la **kongresa trinkejo**.

### SENPAGAJ GVIDATAJ VIZITOJ, ESPERANTLINGVE

**ekskurso 1 : dimanĉon matene**
Bicikla veturado por vidi la sunleviĝon en Parko Miribel-Jonage. Foriro je 5a15 matene, de la Domo de Italoj. Bicikloj povos esti luitaj surloke de la firmao Vélov’ (ĉirkaŭ 20 €).

**ekskurso 2 : ĉiun posttagmezon**
Furviera monteto kaj la kvartalo Sankto Johano.

**ekskurso 3 : ĉiun posttagmezon**
La monteto Rufa Kruco kaj la Duoninsulo

La piedaj ekskursoj 2 kaj 3 ne taŭgas por partoprenantoj, kiuj havas malfacilaĵon por moviĝi.

### LIBERAJ VIZITOJ

La retejo esperantolyon.org proponas liston de priskribitaj muzeoj kaj parkoj kaj ankaŭ informojn por pagendaj gvidataj vizitoj per buso tra la urbo.

JEFO proponos programon por junaj esperantistoj. Vidu detalojn pri tio ĉe esperantolyon.org

## PROGRAMO

**vendredon la 5-an de majo**
14:00 akcepto de la kongresantoj en CISL

**sabaton la 6-an de majo**
9:00 akcepto en la Domo de la Italoj
9:00 – 11:00 kursoj en la Maison des Solidarités
10:30 – 11:30 prelego pri *Tony Garnier*
11:45 – 12:15 malferma ceremonio de la kongreso
12:15 – 14:00 aperitivo kaj komuna manĝo (regionaj pladoj kunportitaj de la kongresanoj
14:00 – 16:00 komitatkunsido de Espéranto-France
14:30 – 17:30 prelegoj pri *Saint-Exupéry* kaj *Titus Brandsma*, nederlanda pastro, esperantista karmelano, kanonizita en 2022
15:00 – 18:00 ekskursoj 2 kaj 3
19:00 – 20:30 libera manĝo kaj provkantado de la artistoj
21:00 koncerto de Radio Mondo

**dimanĉon la 7-an de majo**
5:15 ekskurso 1
9:00 akcepto en la Domo de la Italoj
9:00 – 11:00 kursoj en la Domo de la Solidareco
10:00 – 12:00 membrokunveno de Espéranto-France
12:30 – 13:00 aperitivo de Espéranto Lyon
13:00 – 14:00 azia bufedo
14:30 – 17:30 prelegoj pri *La fratoj Lumière* kaj *Kiel publikigi en Esperanto*
15:00 – 18:00 ekskursoj 2 kaj 3
19:00 – 20:30 libera manĝo kaj provkantado de la artistoj
21:00 koncerto de Guillaume Armide

**lundon la 8-an de majo**
9:00 akcepto en la Domo de la Italoj
9:00 – 11:00 kursoj en la Domo de la Solidareco
10:00 – 12:30 prelegoj pri *La observado de la spaco* kaj *La lumo kaj la vivo*
12:30 – 14:00 libera manĝo
14:00 – 16:00 komitatkunsido de Espéranto-France
13:00 – 18:00 ekzamenoj de la Franca Instituto de Esperanto
14:30 – 17:30 prelegoj pri *La historio de la loka movado* kaj *La prezentado de Esperanto en la lernejoj kaj aliaj lokoj*
15:00 – 18:00 ekskursoj 2 kaj 3
19:00 liberaj manĝo kaj vespero

**mardon la 9-an de majo**
8:00 foriro de la stacidomo Part-Dieu
9:00 alveno al Saint-Étienne
10:30 vizito de la Senŝtupara domo
12:00 tagmanĝo en restoracio “La novaj tempoj”
14:30 vizito de la Muzeo de la Minejo
18:30 reveno en Lionon
20:00 Esperantista kunveno en KoToPo

## INDIVIDUA SURSKRIBA BULTENO

*Skribu en la lastan kolumnon la prezon de la elektitaj opcioj kaj kalkulu la sumon.*

| | | |
|---|---|---|
| Kitozo (15 € – 30 € – 40 €) | | |
| Plialtigo por aliĝo post la 1-a de aprilo | 10 € | |
| Azia bufedo (dimanĉon tagmeze) | 25 € | |
| Postkongreso en Saint-Étienne | 59 € | |
| Rezervado de ĉambroj (CISL) | | |
| Mondonaco | | |
| SUMO | | |

### Rezervo de la ĉambrojn ĉe CISL

*Streku la ĉelojn korespondantajn al la noktoj, kiujn vi trapasos ĉe CISL, kaj enskribu la sumon en la tabelon ĉi supre.*

La prezo de la ĉambroj estas donita por unu persono kaj unu nokto, matenmanĝo inkluzivita. La lavtukoj ne estas provizitaj.

Por la rezervado de ĉambroj kun 2, 3 aŭ 4 litoj, precizigu la nomon de la personoj, kiuj okupos la ĉambron kun vi:

.............................................................................................................

| 5-a – 6-a de majo | 6-a – 7-a de majo | 7-a – 8-a de majo | 8-a – 9-a de majo | 9-a – 10-a de majo | Sumo |
|---|---|---|---|---|---|
| ~~Ĉambro 1 lito (duŝejo - lavujo - necesejo)~~ (ne disponebla) | | | | | |
| | | | | | |
| Ĉambro 2 litoj (duŝejo - lavujo - necesejo) | | | | | |
| ☐ 36 € | ☐ 36 € | ☐ 36 € | ☐ 36 € | ☐ 36 € | |
| Ĉambro 1 lito (duŝejo - lavujo) | | | | | |
| ☐ 41 € | ☐ 41 € | ☐ 41 € | ☐ 41 € | ☐ 41 € | |
| Ĉambro 2 litoj (duŝejo - lavujo) | | | | | |
| ☐ 29 € | ☐ 29 € | ☐ 29 € | ☐ 29 € | ☐ 29 € | |
| Ĉambro 3 litoj (duŝejo - lavujo) | | | | | |
| ☐ 25 € | ☐ 25 € | ☐ 25 € | ☐ 25 € | ☐ 25 € | |
| Ĉambro 4 litoj (duŝejo - lavujo) | | | | | |
| ☐ 24 € | ☐ 24 € | ☐ 24 € | ☐ 24 € | ☐ 24 € | |